



Saluton!

Vi eble miris, kion la estraro faras? En ĉi tiu eldono de *IND* vi trovas nian jarraporton de 2013 kaj ankaŭ protokolon de la pasinta estrarkunveno – kun planoj kaj temoj kiuj nuntempe diskutas. Se vi havus iajn proponojn aŭ ideojn por renkontiĝoj, aktivecoj aŭ simile, bv. kontaktu nin. Ni ankaŭ tre ŝatus, se vi volas kontribui al *IND* kun artikoloj, bildoj, receptoj aŭ aliaj amuzajoj.

Ĝis!

Amelie



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Amelie Matt – Muntis: jpa

Jarraporto 2013 por NJE

9AN DE MARTO 2014

1 LA ESTRARO

Dum la jaro estis (elektitaj dum la jarkongreso en Oslo jaron 2013):

Amelie Matt, prezidantino

Vidar Benjamin Skretting, vicprezidanto

Kristoffer Haug, sekretario

Hilde Lagnason Bye, kasistino

Jon Machlik, estrarano

Dum la jarkunveno nomumis la estraro Hilde Lagnason Bye kiel komitatanon A pro TEJO.

Okazis 3 estrarkunvenoj en 2013. Retpoŝto kaj rettelefono estis ĉefaj komunikiloj por la estraro.

La jaro donis profiton je NOK 1414,12. Je la jarfino NJE posedis NOK 33241,45 en norvega bankokonto kaj EUR 70,00 en NJE-a UEA-konto. Por pli detalaj informoj, vidu jarkalkulon 2013.

Jarfine NJE havis 19 membrojn (2012: 19).

2 PERILOJ

Inter Ni Dirite (*IND*) aperis en Norvega Esperantisto, 6-foje. Redaktis ĝin estraranoj. En *IND* aperis kaj movadaĵoj kaj artikoloj en Esperanto pri aliaj temoj. *IND* havis, krom la kutiman Pondus-strion, artikolojn pri niaj aranĝoj dum la jaro kaj ankaŭ aliaj temoj kiel ekzemple muziko, vojaĝoj kaj seminarioj.

3 ARANĜOJ

En decembro, NJE aranĝis Zamenhofan fes-

tenon por festi la Zamenhofan jubileon. Partoprenis 6 gastoj, manĝis picojn kaj babilis. Ankaŭ estis loterio, kie ĉiaj partoprenantoj gajnis esperantlingvajn librojn. La festeno estis sukcesa aranĝo. El la estraro partoprenis Hilde, Jon kaj Kristoffer.

Mojosa vespero, iniciatita en 2011 kiel

libertema, monata renkontiĝo, okazis unufoje dum 2013, kutime kun 3-5 partoprenantoj. La plej multaj (aktivaj) membroj loĝas tre malproksime de la aliaj kaj tial estis renkontiĝoj nur skajpe, ne hejme ĉe membroj.

Amelie Matt, 10.03.2014

Estrarkunveno NJE la 10-a de marto

Dato: 10.03.2014; **Loko:** Skajpe; **Partoprenantoj:** Hilde Lagnason Bye, Vidar Benjamin Skretting, Jon Machlik, Amelie Matt; **Skribantoj:** Jon Machlik, Amelie Matt.

1. JARRAPORTO 2013

La estraro aprobas la jarraporton de 2013.

2. JARKALKULO 2013

La jarkalkulo de 2013 estis aprobata de la estraro.

3. JARKUNVENO 2015*

Amelie prezentis la lastajn rezultojn de lokoserĉado de la NEL-estraro. La nuntempa loko estas kabano apud Trondheim. La NJE-estraro nun konsideras havi NJE-renkontiĝon en Trondheim antaŭe aŭ poste.

4. PLANOJ/ARANĜOJ 2014

Mojosa vespero

Nia estraro konsentis havi mojosan vesperon je la 25-a de marto, 29-a de aprilo kaj 27-a majo. Ĉiuj je la 8a horo vespere. Ni kontaktos Leif Arne por eble aranĝi vesperon ne nur skajpe, sed ankaŭ malrete en Oslo.

Renkontiĝoj

Estas ideo kontakti la svedajn kaj finnajn junularajn esperantistojn por eble aranĝi komunan renkontiĝon somere/aŭtune 2014.

5. VENONTA ESTRARKUNVENO

La venonta estrarkunveno okazos la 23an de aprilo je la 20a horo skajpe.

* Kiam ĉi tiu gazeto pretiĝis, la loko por la venonta landa kongreso ne jam decidiĝis.

PONDUS

© Overli. distr. strandoverli@yahoo.com

n-10 45

